LEARN ESPERANTO BY MAIL

by the new correspondence course
of

U. S. Section,

International League

of Esperantist Instructors


Write to: U. S. I. L. E. I.,
3622 N. Market, St. Louis 13, Mo.

For those who wish to hear Esperanto spoken, it is possible to obtain, on loan or for cash, either phonograph records or tape recordings from the Secretary of the Esperanto League:


Mr. Conrad Fisher
808 Stewart Street
Meadville, Pa.

Introduction to
ESPERANTO
THE UNIVERSAL LANGUAGE
The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00
Sent on Five Days FREE Examination!
BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

JUST PLAIN



Teach Esperanto in the Schools!



David B. Richardson, Prezidanto de ELNA

S-ano Richardson havas 34 jarojn. Li estis 12-jara kiam li lernis Esperanton sen instruisto, kiam D-ro Badgley donis al li ŝlosilon kaj instigon. Studis ĉe Universitato de Washington; ĉefstudo, alilandaj lingvoj. Infanteriulo dum la dua mondmilito, postenis en Francujo kaj Germanujo. Fine de la milito, li kaj nia mortinta samideano Jim Sayers ĉeestis la unuan postmilitan kunsidon de germanaj gesamideanoj en Frankfurt, kaj vidis la renaskiĝon de la germana esperantista movado.

Post la milito li finis la studadon ĉe la universitato, edziĝis, nun havas 2 infanojn. Kun sia edzino li ĉeestis la Universalan Kongreson en München en 1951. Li estas teknikisto de radio kaj televido, nun ĉe KVOS-TV, Orcas Insulo, Washington. Li verkas gazetartikolojn anglalingvajn, kaj verkas novelojn kaj poemojn por Esperantaj gazetoj. Lia "Rosario" gajnis la unuan premion en la Belarta Konkurso, en 1952, por originalo prozo.

Estrarano de ELNA 1952-3, redaktoro de la *Revuo* 1953-5, Estrarano 1956-60. Elektiĝis Prezidanto de ELNA, 1960.



The Answer
To the Problem of
a SHRINKING WORLD

☆ ☆ ☆ a real MUST for every
Esperantist and every Esperanto
Club—a full supply of the
new pamphlet:

The
World
Is Getting
Smaller
and
Smaller



for distribution to your friends . . .
enclose them in your letters . . .
pass them out at classes . . .

a conversation-piece
about conversation

Has space for address of local group,
book dealer or individual distributor.

50 for 15 cents
postpaid

ESPERANTO - HILLSBORO,
OREGON

Kapitano Poŝtnikov pri lia kruela kondamno

SIN TROVAS KELKAJ ESPERANTISTOJ pri kiuj oni povas rakonti interesajn epizodojn flanke de aferoj kiuj koncernas Esperanton. Aliparte multaj esperantistoj fariĝas interesuloj nur pro tio ke Esperanto atingis altgradan antaŭeniradon rezulte de iliaj penadoj. Malofte, tamen, staras antaŭ ni persono kiu interesigas samtempe tutajn esperantistaron kaj nacianaron. Tia individuo kredigas je ekzisto de io bona. Ĉi foje mi donos detalojn pri Kapitano Poŝtnikov, kies farojn por kaj pro Esperanto kaj kies rilatojn kun liaj samlandanoj oni ege riproĉis. Ke kredeble li ne meritis la kruelan sorton kiun li trafis estas tiom pli kuriozuskas.

Lia vivo markis triumfon gradon post grado ĝis la tago kiam subite militista kondamno detranĉis bonan karieron. En Ruslando la oficiro akiris ŝatindan reputacion en la kampo de armeaj aferoj, inter la rangoj de esperantistoj, kaj en kvartaloj kie aferistoj kunlaboris. Ekscianta pri liaj altnivelaj plenumoj por Esperanto, la leganto miros ke li kapablis varbi pli ol 100.000 membrojn por la tutrusa Esperanto-asocio kiun li kreis. Analizante la modon laŭ kiu la kapitano prosperis tion fari, esperantistaj kritikantoj, kiuj estis konkurantoj, proklamis senhezite ke li estas duflankulo, montranta unu personon antaŭ la esperantista mondo kaj duan personon antaŭ siaj samlandanoj! Antaŭ 1910 li estis la plej sukcesa organizanto de Esperantaj societoj en la vasta imperio de la slavoj. La caro lin sendis kiel delegiton al la Sesa Mondkongreso de Esperanto, kiu kunvenis en Vaŝingtono en Aŭgusto, 1910.

Tie mi renkontis lin. Li bone impresis preskaŭ ĉiujn kiujn li kontaktis. Oni lin vidis vestita kiel oficiro, ankaŭ kiel civilulo. Vere li radiis ĉarman, elegantan ĝentilecon. Li estis alta, vigla, afabla. Kiam li ridetis mi rimarkis bonspritan plaĉeman

viron kiu penis akordigi siajn sentojn agrable al apudestuloj. Lia sincereco aspektis nesuperflue. Eĉ en Usono li daŭris varbi kunulojn — ĉifoje por la nove naskita Universala Ligo. Min li altiris al ĉi tiu rondo.

Kapitano Aleksandro Poŝtnikov estis hereda nobelulo, aristokratulo, kavaliro de multaj ordenoj. Okaze li fariĝis persistema, rigida, regema, sed ĉiam li estis saĝulo kies prudento kondukis al traktableco. Tia homo ne estigas maltoleron. Malgraŭ sia posedo de bonaj trajtoj, malgraŭ sindonema, energia bonvola rigardo kaj pacienca karaktero, Kapitano Poŝtnikov finis siajn tagojn en 1911 inter esperantistoj kaj samlandanoj sub la nigraj ombroj de perfidulo kaj krimulo. La finbato kiun li spertis prezentas elpeliton kiu malaperis — kiun oni neniam plu vidis ie.

Lia frato estis nia konata, fidela gravulo — mia ofta kunlaboranto — Kapitano Post (naskita Poŝtnikov). Li ne povis kontribui iajn informojn rilate al la malapero de sia frato Aleksandro. La du fratoj servis honorinde kiel oficiroj dum la Rusa-Japana milito. Tiam Kapitano Post hejmlande estis kolonelo kiu konstruis la fortikaĵojn en Vladivostok, Siberujo. Al li ŝuldas la japanoj la enkondukon de Esperanto en Japanujon. S-ro De Beaufront diris ke li estis la unua flue parolanta esperantisto kiun li renkontis el eksterlando. Aleksandro estis kapitano kiu partoprenis en 28 bataloj. Mi kvazaŭ vidas lin en gvardia uniformo ornamita per brilaj insignoj de stabano, kun koloraj rubandoj kaj kruc-

medaloj. Tiel li oficiale aperis en Vaŝingtono.

Lia misio koncernis ne nur Esperanton, sed la disvastigon de la “Universala Ligo”, kiun li fondis. Ĉi tiu organizo celis establi firman unuigon de ĉiuj nacioj, kiu povus certigi internan pacon kaj amikecon inter ili. En la ministrejo pri komerco kaj industrio oni enregistris la Ligon. Poŝtnikov aranĝis kunvenon en la kongresejo kaj 60 kongresanoj ĉeestis. Li klarigis ke la Ligo tute ne estis revolucia afero — ke ĝi havis nenian rilaton al Esperanto kvankam por korespondado la lingvo utilis al la ligoj. Laŭ lia peto mi tradukis el Esperanto la protokolojn, kiujn oni adoptis.

Temante pri la Ligo la kapitano diris ke por antaŭenigi la asocion li enkondukis du konkursojn por la membraro. Li oferis al tiuj kies verkojn oni juĝis plej bonaj altvalorajn premiojn. Du demandoj prezentigis al la konkursantoj, unu por ĉiu konkurso: “Kial bezonas la regnoj la Univerligon?” kaj “Kiamaniere oni povas eterne ĉesi militon?”.

La rado de bonŝanco ĉiam turniĝas. Unu tagon en Junio, 1911, ĝi turniĝis al pozicio kiu trovis Kapitanon Poŝtnikov en St. Petersburgo en stato de zorgego. La helmojn de la plej eminentaj esperantistoj la policanoj traserĉis, inkluzive lian. Ĉi tio ŝokis la tutan membraron de la tiea societo. Nun la nova bildo montras Poŝtnikov staranta antaŭ militistaro, kiu akuzis lin terurige. La aserto estis ke li perfidis sian patrujon vendinte por pago militsekretojn. Jen similaĵo al la fama Drejfus kazo! Oni bazis la akuzon sur dokumentoj kiujn oni neniam publikigis pro tiel dirite nacisekuraj celoj. Poŝtnikov neis la kulpigon forte kaj insiste. La militjuĝantaro tamen kondamnis lin al servado dum ok jaroj en malliberejo kontraŭ peniga laborado. La decido certigis ke li kulpiĝis je krimego de nacia perfido. Oni senigis lin de rango,

de klasprivilegioj, de ordenoj, ktp. La puno estis efektive tutviva malapero, ĉar post la kondamno neniam lin denove vidis aŭ kontaktis, aŭ povis sin priinformigi iuj je.

Tiu antaŭa meritplena oficiro kaj aferisto fariĝis ekzilulo. Foriĝis laŭdinda militkariero, organiza lerteco, grandskala plenumfareblo, neordinaraj projektoj el lia vivo. Lia nomo fimemoriĝis. Ne nur registaraj malamikoj, sed ankaŭ esperantistoj, indulgis por lin meti en kotegon sian honoron en nigrajn ombrojn de abomenado. Neniu, eĉ ne unu kritikanto stulton sentis lin atakante kiam evidentiĝis ke li fariĝis kondamnita. Kiam influhava viro subite subiĝas senhelpe ties tuta vivsperto malfermiĝas — ties kohero krakas. La sorto tiel karakterizis sian viziton al la eksoficiro. Liaj esperantistaj kunlaborintoj ne volis kontentiĝi ĝis kiam Poŝtnikov sian alian buklon oferis al insultoj, plendoj kaj malbonaĵoj.

Ili laŭte asertis ke por la rusaj esperantistoj kaj kolegoj beno estis ke la laboroj de la kapitano ĉesis senrefare ĉar komenciĝis tuj post la kondamno subpremoj kontraŭ ili instigitaj de registaraj instancoj. Nun ili persiste memoris ĉiujn eblajn kolumniaĵojn kiuj efikos por nigrigi lian honoron jenmaniere — Kapitano Poŝtnikov senkonscie disponis financojn — li estis troprecizema okupatulo — li malrigardis ĉiujn kiuj kontraŭis liajn planojn — li rifuzis al aliaj kunlaborantoj partopreni en la gajnoj kaj avantaĝoj rezultaj de sukcesplenaj aferoj — li estis soleca, avida, malica entreprenisto — li forrabis la de aliuloj establitaĵojn bonaĵojn — estante trompulo, ke li uzis siajn oficialajn postenojn por sukcesigi privatajn interesojn — ke li posedis tian influon, kiu permesis al li fari enirojn kaj elirojn en kaj el por ili laborantaj administrejoj kaj vojoj, ktp. Entute multaj bontrafaj plendegoj sin trovis. Tio plejakrae mordis ĉiujn — ke li kapablis

malfermi la pordojn de ĉiuj institutoj por helpi al si mem. Nenio alia ol lia enterigo povis ŝatigi ilin, verŝajne.

La fakto ke Kapitano Poŝtnikov faris por Esperanto multajn elstarajn servojn estis tute forgesita; ke li fondis potenciajn esperantistajn societojn tra tuta Ruslando sub registaraj favoroj fariĝis bagatelajo — ke li iniciatis kursojn eĉ en izolaj lokoj aspektiĝis negrava afero — ke li eldonis ĵurnalojn en Esperanto kiuj instigis ĉie al lernado de la interlingvo klarigis konvinkige al ĉi tiuj ke tio ne ŝuldis pro liaj propraj rimedoj. Kial? Ĉar la klimakso de liaj penadoj, oni asertis, aperigis la *Universalan Ligon*, kiu ja deflankiĝis de pure esperantistaj sindetenaj celoj kaj agoj kaj kiu igis ke li koncentrigu ĉiujn pro kaj per Esperanto akiritajn rimedojn al tiu nova entrepreno.

Mi mem neniam elmensigis liajn bonaspektaĵojn — rezulto de persona konatiĝo. Mi pensas ke li fariĝis viktimo de intrigoj, suspektoj kaj atakoj de malica kaj insida origino; ke li vere estis moralsenta homo kiu martiriĝis. La demando tamen estas: Ĉu la kapitano provizis fatalan eksperimenton, ĉu li estis heroo? Mi prezentis la faktojn. —*William E. Baff*

A copy of the first number of a new world peace newspaper with its title in Esperanto, *La MONDCIVITANO*, has just been received by our secretary. The paper, printed in English and French, approximately 12 by 18 inches, four pages, is the newspaper of the Commonwealth of World Citizens, or its more usual Esperanto name: *La Mondcivitana Respubliko*. Subscription fee is only a dollar. The Esperanto term has been taken over into use in English as *mondcivitan*, both noun and adjective: *Mondcivitans* have *mondcivitan* views. Address is 13 Prince of Wales Terrace, London W 8, England. The Commonwealth's founder, an Esperantist, is Dr. Hugh J. Schonfield, of London.

Kie estas S-ro Smith?

Nelongatempe S-ro Smith abonis nian gazeton. Sed li nun estas perdita. Kial? Nu, mi rakontos al vi . . .

S-ro Smith loĝis ĉe 600 *Hiacinta Strato* en la urbo *Zefiro-ĉe-la-maro*. Kaj ni sendis al li regule po 3 eldonoj. Sed la kvara revenis al ni. Sure, apud la adreso, la poŝtistoj ŝtampis: "Transloĝis. Ne lasis adreson." Do tie la kompatinda revuo kuŝas—soleca, hejmsopira kaj nelegata—sur breto en nia oficejo. Kaj ni nun scivolas pri la kie-ec-o de S-ro Smith. Ĉu li flugiris suden kun la birdoj? Ĉu li subite aligis sin al la bnhomoj en *Ha-Ha-lando*? Ni ne konas.

Kara leganto, eble vi loĝas en *Varmejo-sur-la-dezerto*. Kaj Eventuale vi intencas transloĝi kun la posedaĵoj al *Altpinto-interla-montoj*. Ni konsentas, vi havas nian permeson. Sed bonvole

INFORMU NIN PRI NOVADRESO!

—*Adrian Hughes*

Dua Volumo ESPERANTOLOGIO

Internacia revuo por la lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto.

La reapero de "Esperantologio" estas grava kultura evento por la tuta Esperantista movado. La unua kajero jam aperis. La tuta dua volumo kovros proksimume tri jarojn.



La abonprezo por la dua volumo en Usono estas \$6.00. La jam kompletigita Volumo I havebla je \$5.00.

La usona peranto estas
R. C. Marble, Box 4127,
Van Nuys, California.

*Sendu monon kaj abonojn NUN
al la peranto.*

Bonvolu Skribi

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poŝtkarto; bk., bildkarto; pm., poŝtmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita; interŝ., interŝanĝi; p. ĉ. t., pri ĉiuj temoj.

Encoina Medialdea, Strato Archiduque Carlos, n-16-1a, Valencia, Hispanujo. 24-jara fraŭlino, flegistino. Kun Usono.

Milko Hr. Iliev, Ruse, str. Stara Zagora No 28, Bulgario. 28-jara, teknologo en teknika gimnazio, dez. kor. kun ĉiuj landoj, bk.

Vsevolod Vasilieviĉ Kulikov, Omsk 7, Sazonova 33, USSR. Dekano de fizika-matematika fakultato, dez. kor. kun usonano.

Pekka Lehtinen, Mikkulankatu 1 as 5, Lahti, Finnlando. 23-jara fraŭlo, dez. kor. kun amerikano, prefere pri naturscienco; intereso pri ornitologio, fotografado, vegetarismo kaj iomete entomologio.

S-ro Georgi Kostov, str. Vasil Zarkov 19, Vraca, Bulgario. Du 19-jaraj bulgaroj dez. kor. p. ĉ. t., interŝ. vidaĵojn, notojn por danemuziko, gramafondiskojn, kaj revuojn pri filmo, tekniko, modo, ktp.

Edmund Jaan, Estona SSR, Abja, PK 11, USSR. Dez. kor. kun usonaninoj.

S-ro Ĉandar Dimitrov, str. Leonova 104, Vraca, Bulgario. 17-jara, dez. kor. kun ĉiuj p. ĉ. t., interŝ. vidaĵojn, danemuziknotojn, rev., ktp.

Lendvai Ferenc, Badaconsyotoma, Hungario. Dez. kor., interŝ. pm. kaj bk.

Jozef Kosinski, p-ta Dtugopole zdroj, Dtugopole Dolne Nr. 5, pow. Bystrzyca Kt., Pollando. 42-jara, dez. kor. tutmonde, interŝ. bk. kaj pm.

Teresita Garaon, Güemes 1169, La Carlota, Cordoba, Argentino. 28-jara, laboras en Virina Profesia Lernejo, dez. kor. pri folkloro kaj kostumoj, Usono, interŝ. pm.

Nikolaj Cankov Doĉev, ul. Geo Milev 46 bl. III vh. II, Sofio, Bulgario. Pri la vivo en Usono.

S-ro Leif Heilberg, 447 Cole St., San Francisco 17, Calif., Usono. Kun nudistoj, naturistoj, pri organizado de grupoj en UEA kaj INF.

Miroslav Vacek, Stalinova 109, Praha 3, Ĉeĥoslovakio. Dez. kor. kun usonanino.

1000 japanoj deziras korespondi per Esperanto kun ĉiuj landoj! Skribu al:

Kenzo Kusakabe, ĉe Murakami, 53 Shibashimotakanawa-machi, Minato-ku, Tokio.

The Indonesian Esperanto Association held its first General Conference, April 1 to 3, 1960, in Djakarta. Mrs. Datoe Toemenggoeng, who recently visited the U. S., was General Chairman. The Governor of Djakarta, the Ambassador from Poland and a representative of the Department of Education, Instruction and Culture attended the Conference.

Also present were Esperantists from various parts of Indonesia who had never spoken Esperanto or heard it spoken, but had

learned only from the printed page. By the end of the Conference they were able to participate in Esperanto conversations.

Among decisions of the Conference:

The name "Indonesia" in Esperanto shall be spelled "Indonezio."

The government of Indonesia shall be requested to give, through its Department of Education, Instruction and Culture, assistance to the Esperanto movement.

The address for the central organization is: Indonezia Esperanto-Asocio, Pintu Besi 39, Djakarta, Indonezio.

^ Frecjo kaj la Homoj de Marso

de Stephen Block

Resumo: *Marsanoj, dezirante biologian specimon por sekci, ŝtelis Freĉjon el Tero kaj portis lin al Marso. Admiralo Pfui prenis Freĉjon al D-ro Fiaĉulo, la sekcisto, sed antaŭ ol ĉi tiu povis sekci lin, fremdaj marsanoj savis Freĉjon, portis lin en flugteleron, kaj forflugis. Post longa flugado, la telero subite plunĝis malsupren al la dezerto.*

Antaŭ ol la telero povis krakegi sur la dezerton, malfermiĝis grandega truo en la sablo. La telero enflugis en la truegon kaj en grandan tunelon. La tunelo, tra kiu la telero nun flugis, rapide horizontaliĝis, kaj la malfermaĵo malaperis, lasante ilin en tuta mallumo.

Tuj kiam Freĉjo reakiris sian voĉon, li demandis: "Kie ni estas? Kien ni iras?"

"Kvietiĝu," diris marsano. "Vi baldaŭ eltrovos."

Eĉ dum ili parolis, aperis lumo ĉe la ekstremaĵo de la tunelo. Ili rapide alproksimiĝis la lumon, kaj subite flugis la telero el la tunelo kaj en grandan, hele iluminatan ĉambregon. La telero surteriĝis sur la plankon de la ĉambrego, sur kiu ankaŭ kuŝis aliaj flugteleroj.

"Ni eliru," diris la marsano, kun kiu Freĉjo estis parolinta. La aliaj marsanoj restis en la telero, sed Freĉjo kaj la unua marsano eliris kaj iris al malgranda muro, apud kiu staris du gvardistoj.

Unu el la gvardistoj diris: "Ni atendas la tagon." "Kiam Marso estos liberigita!" respondis la marsano kun Freĉjo. "Pasu," diris la gvardisto. La du gvardistoj paŝis aparten, kaj la pordo malfermis sin. Freĉjo kaj la marsano iris tra la pordo kaj en

longan koridoron. Multaj aliaj koridoroj kruciĝis kun la unua koridoro, sed ili iris rekte antaŭen. Ĉiu el la marsanoj, kiujn ili renkontis, portis aŭ laborvestaron aŭ uniformon. Fine ili venis al la ekstremaĵo de la koridoro. En la muro estis pordo, kaj apud la pordo staris du pluaj gvardistoj. Unu el la gvardistoj diris: "Ni atendas la tagon." "Kiam Marso estos liberigita!" respondis la marsano kun Freĉjo. "Pasu," diris la gvardisto.

Freĉjo kaj la marsano iris tra la pordo kaj en grandan ĉambbron, kiu ŝajnis kiel oficejo. Multaj marsanoj sidis apud skribtabloj, okupate per kontrolado de paperoj aŭ laborante per fremdaj maŝinoj. La marsano kondukis Freĉjon al pordo en la kontraŭa muro, apud kiu staris alia gvardisto. "Agento RK-581, kun la terano," diris la marsano. "Eniru," respondis la gvardisto. "Kapitano Televido atendas vin."

Freĉjo kaj la marsano paŝis tra la pordo kaj en malpli grandan ĉambbron. Meze de la ĉambro staris skribtablo, malantaŭ kiu sidis marsano. La marsano kun Freĉjo salutis kaj diris, "Agento RK-581, raportante, sinjoro. Ĉi tiu estas Freĉjo Jones, la terano, kiun D-ro Fiaĉulo volis sekci."

"Jes," respondis la sidanto, kaj ekstaris. Li estis la plej granda marsano, kiun Freĉjo iam ajn vidis. Li estis eĉ pli alta ol Freĉjo. Li diris al Freĉjo: "Mi estas Kapitano Televido, kaj mi estas respondebla pri via savo."

"Televido ne estas nomo," diris Freĉjo. "Ĝi estas meblo. Mi dankas vin por savi min, sed kial vi faris ĝin? Kie mi nun estas?"

"Televido estas mia koda nomo, kaj la sola nomo, laŭ kiu vi konos min. Vi estas en la ĉeflokalo de la Marsa Subtero. Ni laboras por la revolucio, kiu renversos la imperian firegadon kaj establos liberan marsan respublikon. Admiralo Pfui, la reala potenco

malantaŭ la trono, volas fari milton kontraŭ Tero, kaj sklavigi la teranojn. Ĉar ĉi tiu estus etendiĝo de la imperia potenco, ni tutkore kontraŭas ĝin.”

“Mi ankaŭ tutkore kontraŭas ĝin!” interrompis Freĉjo.

“La imperialistoj deziris specimenon de la teranoj, por eltrovi iliajn fort ecojn kaj malfort ecojn,” daŭrigis Kapitano Televido. “Dezirante malhelpi la imperialistojn ĉe ĉiu paŝo, ni ŝtelis vin de ili.”

“Sankta bovo!” ekkriis Freĉjo. “Vi devas resendi min al Tero! Mi devas averti Teron pri la minaco de Marso!”

“Malfeliĉe, ni ne povas fari tion,” respondis Televido. “Ni pe povas flugi iajn ajn telerojn preter la orbitan patrolon, kiun la imperio subtenas. Iaj ajn teleroj, kiujn ni sendas super la atmosferon, estas pafdetruitaj de la patrolteleroj. Do, vi . . .”

“Ĉu vi volas diri, ke mi estas izolita sur Marso?” ekkriis Freĉjo.

“Ĝis Marso liberiĝos, jes.”

(daŭrigota)

In February, the General Director of UNESCO announced that the Executive Committee during its 55th session had included the name of Dr. L. L. Zamenhof, author of Esperanto, among the six great personalities of the world, the anniversaries of whose birthdays UNESCO would officially celebrate in 1960.

Campinas, Brazil, has a Zamenhof Street.

More than 700 persons attended the evening meeting in recognition of the 100th anniversary of Dr. Zamenhof's birth, Dec. 15, 1959, in Pyengyang, Korea.

“Vivo de Zamenhof” (Life of Zamenhof) has been translated into Norwegian.

OFFICERS of ELNA

President: David B. Richardson
RFD Box 81, Eastsound, Wash.

Vice-President: Charles E. Peterson
8314 E. Florence, Downey, Calif.

Secretary: Conrad Fisher
808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania

Treasurer: Adrian Hughes
476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon

EXECUTIVE BOARD

Thomas A. Goldman
7008 Millwood Road, Bethesda 14, Md.

Howard G. Borden
865 Lower Ferry Road, Apt. 103, Trenton 8,
N. J.

John L. Lewine
50 Overlook Terrace, New York 33, N. Y.

H. K. Ver Ploeg
1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington

Mrs. Mary Gibson
P. O. Box 117, Riverdale, Fresno County, Cal.

Wm. Harmon
3122 Silva St., Lakewood, Calif.

Armin F. Doneis, Sr.,
P. O. Box 105, Pharr, Texas

S-ino Martha Walker
2846 Monticello Road, Napa, Calif.

Catherine Schulze
410 Darrell Road, Hillsborough, Calif.

The Danish Ministry of Instruction has assigned to the Central Danish Esperanto League 5000 crowns to help in the publication of a Danish anthology in Esperanto.

The booklet on Denmark “Kie abundo estas malofta, kaj manko pli malofta” has been in such demand among Esperantists that the first edition has been exhausted, and the Danish Ministry for Foreign Affairs has ordered a new edition.

Pola-Esperanta Geologia Klubo, Jasma 6, Warsaw, is seeking international contacts among scientists and technologists.

The World Esperanto Journalists' Association has launched a bimonthly magazine.

LOCAL ADDRESSES

The Review lists, without charge, addresses of local Esperanto groups or of Esperantists who want local contacts to form new local groups. It is not necessary that the members of such groups be members of the League. ELNA exists for the purpose of helping all who want to promote Esperanto. If you want advice on forming a local club or study group, write to: Esperanto League for North America, Meadville, Pa.

In case of a group representing some religious, political or other special interest, please state affiliation or special interest. We make no judgment, and accept no responsibility, concerning Esperantist special interest groups, but will list addresses (if in North America) so that persons of similar interests may find congenial groups.

Kanada Esperanto-Asocio: Box 52, Terminal A, Toronto, Canada.

ELNA Youth Section: Charles Powell, Route 1, Box 92, Wimauma, Florida

Esperanto Society of San Francisco, 1031 Noriega St., San Francisco 22, California.

Pasadena Esperanto Class, YWCA, 78 North Marengo Ave., Pasadena, California.

Peninsula Esperanto Club, 410 Darrell Road, Hillsborough, California.

Esperanto Society of Sacramento, 5631 Balboa Circle, Sacramento, California.

Greenfield Esperanto Club, 63 Congress St., Greenfield, Mass. Phone PR 3-7031

La Esperanto-Amikoj, sec. Marjorie E. Chupa, 390 Franklin Terrace, Washington, Pa.

Esperanto-Klubo de Los Angeles: 1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29, California.

Esperanto-Societo de San Diego: P. O. Box 6215, San Diego 6, California.

Esperanto Club of Santa Monica: 855 Franklin St., Santa Monica, California.

Napa Esperanto Club: c/o Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California.

Esperanto Coterie of Texas: P. O. Box 805, Houston 1, Texas.

Seattle Esperanto Society: 3231 West 62nd St., Seattle 7, Washington.

Esperanto Society of Greater New York: 50 Overlook Terrace, New York 33, New York.

Esperanto in Buffalo: P. O. Box 222, Niagara Station, Buffalo 1, New York.

Esperanto Society of Chicago: c/o H. Tobusch, 55 E. Washington, Chicago, Illinois.

Washington Esperanto Club: Apt. 101, 2829 Gainesville St., S. E., Washington 20, D. C.

Esperanto Study Group, Y.M.C.A., Meadville, Pennsylvania.

John Clifford, 750 47th Avenue, Capitola, California

Frances Leshner, c-o Dainoff, 4 West 28th St., New York 1, N. Y.

Allan E. Fineberg, 62 Bergen Ave., Jersey City 5, N. J.

James Keating, 323 Nottingham St., Springfield, Mass. Phone REpublic 9-6025

Arland R. Meade, 26 Central St., West Springfield, Mass. Phone STate 8-8481

Donald Munro, R. D. 2, Box 273, Quakertown, Penna.

Floyd A. Clarke, 1723 Ilingworth Ave., Allentown, Pennsylvania.

K. M. Whitten, 5233 N. Fifth St., Philadelphia 20, Pennsylvania.

Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan, Canada.

Tom Haxby, P. O. Box 274, Marshall, Arkansas.

Mrs. Starling Przybilla, P. O. Box 685, Whitehall, Wisconsin.

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue, Spokane 32, Washington.

Lucy Pier, 807 Bon Air Road, Lansing 17, Michigan.

Jaroslav Kleprlik, 1206 Lamar Street, San Antonio, Texas. Phone CApital 3-6624.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, U. S. representative: William E. Baff,
610 C St. S. E., Washington 3, D. C.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, U. S. representative George Falgier,
3622 North Market St., St. Louis 13, Missouri.

Esperanta Libro-Servo, 2222 Crest Drive, El Cajon, California.

ESPERANTO LEAGUE BOOK SERVICE, Middleton, Wisconsin.

ELNA Membership and Organization Committee, 3122 Silva St., Lakewood, California.

Why not get in touch with the one nearest you?

Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in hats, *ĉ* as *ch* in church, *g* as in *go*, *ĝ* as *gem*, *ĥ* as *ch* in loch, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in azure, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*: with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Particples (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

The great worldwide organization to promote Esperanto
for people of all nations, all religions, all political beliefs
IS

Universala Esperanto-Asocio

Representative in U. S. A.: D. E. Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, Calif.
In Canada: W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto, Ont.

MEMBERSHIP, YEARLY DUES: With Yearbook only, \$1.90; with Yearbook
and magazine, \$3.75; Sustaining Member, \$5.75. Life Member, \$75.00.

The ONLY North American organization affiliated with UEA is
Esperanto League for North America

Every member of the League is a member of UEA

JOIN NOW. Regular Member, \$3; Man and wife (each with Regular Member
privileges, but receive only one copy of publications), \$4; Supporting Member, \$5;
Patron, \$10; Life Member, \$50. Make checks payable to: Esperanto League for
North America, Inc. Secretary: Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Penna.

**For books in or about Esperanto,
for textbooks, dictionaries, readers**

Esperanto League Book Service

Middleton, Wisconsin

or

Esperanto Press, P. O. Box 344, Oakville, Ont., Canada

Esperanta Libro-Servo, 2222 Crest Drive, El Cajon, Calif.
